

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

---

## IPR

Organo de Internacia Ligo  
de Esperantistaj Instruistoj

## ILEI

---

Jarkolekto 11

N-ro 1, 1981

Edistudio, Pizo, Italujo

# Internacia Pedagogia Revuo - n-ro 1, 1981

fotokompostado: Edistudio, C.P. 213, I-56100, Pisa, Italujo, Tf. +39/50/48670  
presado: Offset Vallerini, Pisa, Tf. +39/50/40604

## Enhavo

*Al la sekciestroj*  
*El la nova koncepto pri edukado*  
*Bildkarta instru-ludo*  
*Baza kurso de Esperanto*  
*Fonetika skribado de lingvoj*  
*Nelastaj vortoj pri la supersignoj*  
*Oficiala komuniko de la Akademio*  
*OEO kaj ni*  
*“Ni parolu pri faktoj”*  
*Grésillon invitas*  
*15-a konferenco de ILEI*

Enaĵo: Aliĝilo por la 15a konferenco

ILEI  
I.T. Maddern  
B. Golden  
A. Spencer  
M. Marcetta  
B. Golden  
—  
Bernard Golden  
E. Geraldis de Cervalho  
—  
HEA

## Al la sekciestroj kaj membroj de ILEI

### BONAN NOVAN JARON 1981!!

Laŭ decido dum la konferenco en Malto pasintsomere la kotizo por ĉiu membro de ILEI kun Internacia Pedagogia Revuo estas 30 (tridek) svedaj kronoj. (Sen IPR 15 sv. kr.)

Por ke Vi havu la Revuon tuj post la apero de la unua numero, bonvolu sendi kiel eble plej baldaŭ la kotizon al la kasisto Olle Olsson kun samtempa kopio al la ĝenerala sekretario, doktoro Mario Dazzini, Cas. post. 22, I-54100 Massa C. (Italujo).

Plej bone estas pagi per poŝtĝiro en *sveda* mono (ev. poŝtmandato en *sveda* mono) al

ILEI-kasisto Olle Olsson.  
poŝtĝira numero 68 21 17-7  
Bantorget 3,  
S-222 29 Lund.

Se Vi uzos bankon por la pago, ne forgesu aldoni dek svedajn kronojn por la bankkosto!

La bank-adreso estas  
Skandinaviska Enskilda Banken  
ILEI 17 5624 25 007 79,  
Bantorget 3,  
S-222 29 lund.  
Antaŭdankante pro Via rapida pago mi sendas samideanajn salutojn.  
Olle Olsson.

La jaro 1981. Kiom da Esperantistoj estas en la mondo? Knabo- 9 jaraĝa- el mia Esperantoklaso demandis min. Ja, kiom? Ĉu ni pliiĝis- esence?

IPR ekiros denove sian vojon- statistike komenciĝos la 11-a jarkolekto.

Jam dek jarojn ĝi kunligas nin, trans limoj kaj trans lingvoj! Tamen ĝi sentas sin soleca kvazaŭ orfo.

Kio mankas estas kunlaborantoj, verkantoj, tradukantoj, raportantoj- ĉiu sekcia lando havas riĉan pedagogian vivon sed nur malmulta materialo alvenas.

Kaj mankas la legantoj! Estas multnombraj membroj en gravaj sekcioj- sed eĉ ne unu abonis!

Kio estas ILEI? Laŭvide nur granda fikcio. Ni notas en IPR 35 sekciojn efektivaj estas maksimume nur kvin, la aliaj estas pli-malpli nur kartoteko-loĝantoj en nia administrado.

Tamen, interalie gravas por la vivkapablo de ILEI ĝia financa stato- kaj ni ne rajtas pretervidi ĝin. La mondvasta inflacio necesas adaptiĝon de niaj kotizoj:

por 1981 validas 30 kronoj por la jarabono

sen IPR validas 15 kronoj! (membro sen IPR)

Bonvolu legi la informon de nia kasisto- sed ankaŭ la informeton pri nobla subtenanto.

HS

De persono, kiu volas esti nekonata, la kasisto de ILEI ricevis monsumon por stipendio al partoprenant(in)o de infankongreso aŭ simila aranĝo, kie infanoj de diversaj landoj renkontiĝas kaj per Esperanto amikiĝas.

Pri la kondiĉoj bonvolu rigardi Internacian Pedagogian Revuon 1/80 paĝo 21 aŭ skribu al la suba adreso.

La peton pri stipendio bonvolu sendi minimume tri monatojn antaŭ la komenciĝo de la renkontiĝo al la kasisto de ILEI, specialinstruisto Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29 Lund, Svedujo.

Al la prezidanto de ILEI kolego Maddern estis bone konata, kvankam mi persone neniam renkontis lin. Multaj leteroj ŝanĝiĝis. Efika helpo kaj utilaj konsiloj de li konstruis ĉiam portkapablan ponton por kontaktoj kaj spertoj inter aŭstraliaj gegolegoj kaj ILEI.

Lia morto je la 28-a de Julio 1980 serioze trafis nin.

Elstara pedagogo ne plu estas inter ni. Li lerte kapablis internacie ligi gekolegojn pere de sia grup-letero.

Pri edukado kaj lernejo li evoluigis rimarkindajn kaj konkretajn proponojn.

IPR kun granda plezuro publikigas grandan parton. Koran dankon al kolego Karel Kraft el Borotiĉe (Ĉeĥoslovakio) kiu tradukis la tekston el la angla.

## El la nova koncepto pri edukado

Tradukita el la angla de Karel Kraft, Ĉeĥoslovakujo

### Signifo de la edukado

La kutimaj mankoj, kiuj influas edukajn sistemojn speguliĝas ĉefe per manko da instruistoj kaj da ejoj per enkonduko de kvotoj en la universitatoj, per multaj fia-skintoj precipe en la dua kaj triagradaj lernejoj. Ĉi tiuj malbonoj fontas en io pli profunda, en io fundamenta. Ili spegulas la neintereson kaj la nescion de la socio, speciale la neintereson kaj la nescion de la fakuloj en la eduka afero pri la vera substanco de la eduko.

Ankaŭ freŝaj raportoj pri edukado el kiu ajn parto de la mondo, malgraŭ siaj kvalitoj en certaj detaloj, maltrafas la veran kernon de la problemo. Ne estas pro tio, ke ili ne vidas la solvon, sed ĉar ili ne vidas la problemon. Tial ili venas al konk-ludoj devenantaj el falsaj premisoj.

La du fatalaj eraroj, kiuj konfuzas nian pensadon estas la konjekto, ke la lernejoj kaj la universitatoj estas la ununuraj substratoj de la edukado kaj due ke la eduka-do estas procedo celanta de ekstero en la internon de la individuo.

La malo estas la vero. Nia edukado komenciĝas en la tago de nia naskiĝo kaj ĉe-sas kiam ni mortas. La lernejoj servas nur kiel renkontejoj por la junularo kaj ne kapablas eduki tiujn, kiujn ili amasigas. Male, la lernejoj ofte nur baras, domaĝas aŭ malfruigas la plenumon de la procedo. Pravas la ŝoka eldiro de la angla verkisto, G. B. Shaw, "Mian edukigon interrompis mia subiĝo al la lernado". La epigramo de G.B. Shaw kernas en la fakto, ke niaj "edukistoj" ligas la du konceptojn — la edukadon kaj la lernadon — en unu fokuso, dum Shaw ĝuste distingis inter ili.

Eduki signifas evoluigi de la interno en la plej larĝa skalo la denaskajn kapablojn, kiujn ni posedas. Tio neniel similas al la ŝtopigo per faktoj kaj la ekzamenado, tiom ŝatataj de niaj "edukistoj", administristoj kaj de niaj institucioj.

En pli larĝa senco de la vorto ni edukas nin mem kaj ĉio, kion la cetera mondo povas fari por ni, estas zorgo pri la ĝusta klimato, medio kaj kondiĉoj por la interna evoluo. Niaj mensoj similas niajn korpojn. Ambaŭ kreskas laŭ sia propra procedo,

kondiĉe ke ili havus la necesajn dozojn da manĝoj, da ekzercoj kaj da ĉio cetera, necesaj por la fizika kaj mensa sano. Eĉ se ne ekzistus lernejoj, niaj mensoj kaj korpoj plue kreskus.

La plej utila servo, kiun niaj lernejoj povas plenumi, estas malkovri al la mensoj de la gejunuloj, novajn mondojn da intereso kaj da aventuroj. Tial, la plej gravaj praktikaj kapabloj, kiujn ni povas instrui al niaj infanoj estas skribado, parolado, legado kaj kompreno en nia propra nacia lingvo. La tasko de la lernejo estas helpi kaj ne trudi penetri en la trezorojn de la skribita mondo, kaj eksciti kvalitojn por la alproprigo de la kulturaj valoroj de la homaro.

Ni nur palkonture konstatas, ka niaj lernejoj plenumas tri funkciojn. La unua kaj la plej grava funkcio estas eduki la internajn kapablojn de la lernantoj. Ĉi tiun taskon ne plenumas la lernejo tre bone. Povas esti, ke ĉi tiu evoluo efektiviĝas kaj probable eĉ nun efektiviĝas pli perfekte kaj pli rapide ekster la lernejoj. Ĉiuokaze, ĝiuste ĉi tion Shaw opiniis.

La dua funkcio estas instrui la fundamentajn teknikajn kaj praktikajn laborlertecojn kaj krome ankaŭ la specialajn lertecojn kaj kapablojn profesiajn. Ankaŭ en ĉi tiu sfero niaj edukaj institucioj mistrafas la celon. Kaj la duagrada kaj la triagrada lernejoj ne preparas bone la venontajn instruistojn, kuracistojn, juristojn, arkitektojn, inĝenierojn, teknikistojn, same kiel plumbistojn, ĉarpentistojn, mekanikistojn, kiuj plimulte lernas pri sia laboro nur kiam ili forlasas la benkojn de siaj lernejoj kaj universitatoj.

La tria funkcio de la lernejo estas kontroli. Ni amasigas niajn junajn homojn en instituciojn nomataj lernejoj por kontroli la plej grandan parton de iliaj kromdormaj horoj, pli efike ol ni tion povus plenumi hejme. Granda parto de nia instrumaterialo ne havas tiom edukon kiom okupigan taskon, ĉar okupita homo povas malpli malutili.

Malbonŝance ni ne klare perceptas la situacion kaj, konfuzitaj per la vorto "eduko", ni vastigas la jarojn de la infansidado en la lernejoj multe pli ol estas vere bezone. La pli aĝaj studentoj de la duagrada lernejoj, de la universitatoj, koncentritaj en la kazernformaj amasigejoj, kie oni malpermesas al ili plenumi iun utilan laborokupon, restas tie multe pli longe ol necese en situacio de kuratoreco.

Povas esti ke post 50 jaroj ne plu ekzistos la lernejoj kaj la universitatoj en nia nuna senco, ke ili estos organizitaj tute alimaniere. Tio ne povas okazi rapide, malgraŭ la urĝo de la tasko, ĉar oni ĉiam devas enkalkuli nian konservativismon, kiu bremzas al novaj ideoj. Ni fariĝis tiom ligitaj al nia eduka sistemo, ni estas tiom konformigitaj al ĝia aspekto, ke ni malfacile englutas la ideon pri la ŝanĝo. Nia tendenco inklinas nin aŭtomate kontraŭi la ŝanĝojn.

Tamen, ni komencu la longan procedon krei pli bonan edukan sistemon efektiviĝante kelkajn malmultajn reformetojn evidente bezonajn. Ekzemple, ni komencu per nuligo aŭ limigo de la ekzamen-sistemo, per limigo de la nombro de la lernantoj por unu klaso al maksimumo 30, per certigo de taŭgaj ejoj kaj instuistaro por ĉiuj lernejoj, per nuligo de kvotoj por la triagrada lernejoj. Tion ĉi oni povus efektiviĝi uzante jare multe malpli da mono ol tio kion ni nun elspezas por la estantaj lernejoj kazernoj.

## Devigo en edukado

Ekzistas du specoj de devigo en la eduka sfero — la leĝa kaj la socia. La unua trudas al la infanoj restadi en la lernejo ĝis ilia 15-a jaraĝo. La dua devigas en la universitato por akiri la bezonatan dokumenton pri kvalifikigo. Ambaŭ devigoj estas superflua kaj nedezirindaj, sed en ĉi tiu ĉapitro ni limigos nian atenton al la leĝa devigo.

Tiuj landoj, kiuj altigis la aĝon, en kiu oni rajtas forlasi la lernejon, al la 15-a aŭ al la 16-a jaro, gajnis per tio nenion. Malgraŭ tio tiuj landoj ŝajne konvinkis sin, ke tia decido apartenas al la "progresigaj agoj". Oni ofte tre nereale taksas ĉi tiun problemon, aŭ eble pli precize, oni ĝin absolute ne rimarkas. Ni eĉ maltrafas nomi la problemon ĝuste. Ni diras "La finiĝo de la lernejevizito" dum ni komprenas la faktan signifon "La lasta jaro aŭ jaraĝo de la deviga lernado". Efektive, ne ekzistas kaj neniam ekzistis ia lernej fina aĝo. La lernantoj povas vizitadi la lernejojn kiom longe kiel ili deziras kondiĉe ke ili havu la financajn rimedojn por la studenta vivo kaj ke ili plenumu kondiĉojn de la akcepta ekzamena komisiono. La aĝo mem ne signifas iun baron.

Se ni prikonsideras la leĝan devigon en ĝia vera signifo, "aĝo de deviga lernado" ni ricevas tute novajn konkludojn. Ni klare frontas la malnovan antagonismon inter la rajtoj de la ŝtato al devigo kaj la rajtoj de la individuo al libero kaj memdeterminigo. Kiam oni atingas la 14-an jaraĝon kaj deziras forlasi la lernejon por serĉi laborokupon, ĉu ĝi atingas iun celon per ĉi tiu devigo?

La edukado estas senpage nur en limigita senco. Kostas monon por aĉeti manĝaĵojn, vestaĵojn kaj la ceterajn bezonaĵojn dum la studjaroj. Plilongigo de la devigaj lernejoj rezultigas por multaj gepatroj ekonomiajn komplikaĵojn dum la jaroj. Kiam la infanoj jam kapablas memstare vivteni sin, ĉu la ŝtato rajtas preskribi tiajn trudojn?

Tiuj lernantoj, kiuj restas plue en lernejo por akiri pli altan kvalifikigon kun la espero, ke ili ricevos pli bonan pagatajn postenojn, ne bezonas ĉi-specan trudadon. Sed kio pri tiuj malpli dotitaj studcele, kies ŝancoj sukcesi en la ekzamenoj laŭ la postulataj niveloj estas tiom dubindaj, ke ne valoras prikonsideri ilin? Ĉu oni trudu al ili pluan restadon en la lernejo? Ankoraŭ neniu pedagogo sukcesis konvinke pruvi utilon de la plilongigo de la malfeliĉa vivo por tiuj ĉi kompatindaj lernantoj. Ne ekzistas logikaj argumentoj por la aserto, ke la plilongigo de la deviga lernado estas "bona afero" aŭ ke ni devas sekvi aliajn landojn nur ĉar ili faris senpripensajn decidojn.

La popolo estas influita pe sia emocia, neracia kredo, ke la lernejoj povas evoluigi ne nur la kaŝitajn kapablojn de la infanojn, sed ke ili eĉ povas provizi ilin, kiam la naturo nesufiĉe dotis la infanon; ke longa restado en lernejo igos ilin inteligentaj. Sed eĉ la plej bona instruisto en la mondo ne povas igi neinteligentan infanon inteligenta. Ĉi tiu aserto ne pravigas iun ajn sinteni superece aŭ indulgi en intelekta snobeco. Kvardek procentoj de nia junularo sub mezaj kapabloj ne taŭgas por pliagra

da akademia trejnado, sed ne estas dubo, ke la plimulto el ili fariĝos estimindaj civitanoj plenumantaj utilan laboron en la komunumo. Se iu knabo deziras labori en metia fako, ekzemple, li multe pli lernos plenumante servojn en tiu metio ol sidante en la benko. Li ankaŭ iĝos multe pli feliĉa plenumante ion, kion li scipovas, anstataŭ provi ion, kion li ne kapablas.

Devigi la maturiĝantajn gejunulojn al lernevizitado kontraŭvole egalas fermi ilin en karceron. Tiaspecaj lernantoj rezistos kaj opozicios al siaj gardistoj kaj provos ĉiujn metodojn por eskapi. Ĉi tiu situacio estas la vera fono de rakontaĵo kia "La Ĝangalo de la Tabulo Nigra" (The Blackboard Jungle), — tre severa akuzo de nia eduka sistemo kaj de nia "aĝo de la deviga lernado".

Ni malŝparas niajn tempojn, monon kaj energion adaptante al la studado kaj flegante junulojn, kiuj ne deziras esti flegataj, kaj instruante tiujn, kiuj kontraŭas la instruadon.

Iam ni aŭdas onidirojn pri la perdo por la socio, kiam la infanoj forlasas la lernejojn en sia 14-a jaraĝo. Ne estas perdo en tio. Sufiĉas rememori, ke tiaj homoj, kiaj estis Henry Ford kaj Thomas Edison, estis nur malmulte instruitaj kaj malgraŭ tio, aŭ pli ĝuste ke la tuta mondo iĝas ilia ŝuldanto. La perdojn, kiuj okazas, ne kaŭzas la malalta lernejojna aĝo, sed la ekonomia premo, kiu devigas eminentajn kaj kapablajn lernantojn frue serĉi laborpostenojn. La univertitataj studoj estas tre multekostaj kaj ekster la ebloj de la plimulto, Multaj, kiuj volas daŭrigi studojn, ne povas. Ili devas foriri por vivteni sin.

La kerna vorto en la kerna frazo "senpaga kaj deviga instruado" de la Granda Eduka Leĝo (Education Act) de la jaro 1872 estas la esprimo "senpaga" kaj ne "deviga". Eble ni devus nun iom ŝanĝi la tekston kaj leĝproponi "senpaga kaj subvenciata edukado". La nuna sistemo de subtenoj estas nur malmulte pli bona ol nenio.

Ni en Aŭstralio kulpas pri iom ne konsekvenca pensado kaj pri iom nelogika rilato konsekvence kun la plilongigo de la devigaj lernejoj. Ni planas, ke ĉiu infano atingu minimume la abituriantan atestilon. Kaj jen, sekve de nia sistemo de ekzamenado, ni forpuŝas duonon de nia gelnantaro de ĉi tiu nivelo, pruvante tiamaniere, ke estis nur malŝparo de tempo sendi ilin en la lernejoj. Necesas ke iom pli profunde ni pripensu pri edukado kaj lernado.

## Ĉasado de atestoj

Nia falsa kompreno de la vera signifo de la vorto "eduko" estas klare pruvata per la uzo de la esprimo "deviga edukado", kiu fakte montras kontraŭecon de la terminoj. Edukado ne povas esti ordonata, ĉar ĝi estas principa sublima natura procedo. Male, lernado laŭ trejnado povas esti trudata kaj tiel ankaŭ laŭvorte okazas.

Ekzameno alfrontas nin per simila situacio en la praktikado de la edukado. Ambaŭ terminoj, ekzamenado kaj edukado, esprimas kontraŭajn ideojn. Kie estas ekzamenado, tie estas malmulte da edukado, kaj male kie estas edukado, tie estas malmulte da ekzamenado. Edukado ne estas ekzamenebla; male la lernado kaj trejnado

estas ekzameneblaj.

Malmultaj temoj instruataj en la duagradaj lernejoj utilas kiel preparo por la sekvanta laborkapablo kaj posteniĝo. Kiom el la lernantoj iam bezonas sciojn el historio, geografio, instruado de fremdaj lingvoj, natursciencoj, matematiko kaj similaj objektoj post la foriro el la lernejo? Ni ne zorgas pri tio, ĉu la amaso de la lernitaj faktoj estas memortenataj aŭ ne. Kiel do tiuj objektoj estas instruataj? Se oni komprenas ilin kulturaj aŭ edukaj objektoj, ni ne devus ekzameni ilin.

Tion, kion ni fakte komprenas kaj celas per nia tradicie ellaborita sistemo de ekzamenoj, estas fakte klopodo determini la inteligentecan de la gejunuloj. Sed, same kiel la edukado ne egalas la lernadon, la inteligenteco ne egalas la posedon de scioj. Parenteze, per ekzamenado de scioj ni povas sufiĉe precize elserĉi tiujn, kiuj estas inteligentaj, ĉar la inteligentaj lernantoj, se ili volas, povas lerni pli rapide, pli bone kaj pli facile ol iliaj malpli bonŝancaj kamaradoj.

Tamen la ekzamenoj estas superflujaj. Kiu ajn bona instruisto aŭ lernejo povas difini la inteligentecan de siaj lernantoj pli precize kaj pli facile ol kiu ajn ekstera ekzamenanto aŭ institucio per sia ekzamentaro. Ekzamenoj prezentas gigantan malŝparon de tempo, de laboro kaj de mono, kaj, krome, ili malvalorigas la edukadon mem, kaj turnas la vivon de studentoj en vivon plenan de mizero. Por plimultaj studentoj en la abiturianta aĝo kaj por plimultaj universitataj studentoj la "edukado" ĉesas esti ĝoja procedo de kresko kaj de evoluo sed anstataŭ nur fariĝos dorna vojo kaj peza ŝarĝo. Ek de la komenco de la lernejjaro la ombro de la jarfinaj ekzamenoj ŝvebas super ili. En ĉi tiu nivelo nia laboro kaj niaj klopodoj koncentriĝas je ekzamenoj; ĉio submetiĝas al la ekzamenoj kaj nia eduka sistemo fariĝas pala imitaĵo de la realaĵo.

Ni jam konsentis, ke la plimulto de tiuj, kiuj sukcesis ricevi la necesan papereton, jam per tio pruvis sian inteligentecan, sed tiu ĉi sistemo ne estas plene fidinda kaj ekzistas ankaŭ eblecoj sukcesi sen speciala doto da inteligenteco. Eĉ pli interesa la sperto, ke granda nombro da algrade inteligentaj homoj malforgas la ĉasadon de la atestoj aŭ ĉe tute ĝin neglektas favore al pli valora okupiĝo.

Bona studgvidanto povas multe helpi la celanton al atestilo. Helpas ankaŭ mono, ĉar tio havigas al konkursanto multe pli longan tempon por plenumi kion inteligentaj celantoj pli rapide povus fari. Eblas okaze kopii la laboron aŭ ideojn de aliaj, kaj tiel atingi pli grandan sukceson ol la kapablo normale ebligas.

Tia situacio kaŭzas, ke ni iam renkontas homojn meze inteligentaj paradi kun aro da diplomoj kiel homoj kun rimarkinde elstaraj inteligenteco kaj kapabloj, ĉar ili en daŭro de tempo kolektis tutan aron da atestiloj en la ĉasado de la paperoj. Kaj jen ree, George Bernard Shaw kun alia trafa eldiro pri edukado: "Tiu, kiu povas, tiu faras, kaj tiu kiu ne povas, tiu instruas." Kvankam ĉi tiu slogano deklaras maljuston pri la estiminda instruista profesio, tamen kuŝas en ĝi grajno da vero. Ni povus parafrazi ĝin same maljuste kaj kun iom da vero dirante: "Kiu estas inteligenta, tio mem montriĝas, kaj kiu ne, tiu gajnas diplomojn".

Ekzamenoj estas superflujaj en la lernejoj, ĉar ĉiu bona instruisto konas siajn lernantojn kaj iliajn kapablojn longe antaŭ jarfina ekzamenado. Ekzamenoj, aŭ pli precize la rezultoj de la ekzamenado estas enuige kaj senesperige ripetiĝantaj. Ili de

vas esti tiaj, ĉar la inteligenteco estas daŭra eco de ĉiu ulo kaj ne sporadeca. Lernantoj, kiuj aperas fronte en unu periodo de la ekzamenado tenos siajn poziciojn ankaŭ dum sekvantaj jaroj. Kial ni do jaron post jaro formikece malkovras denove kaj denove kion ni jam scias?

Ekzistas multaj nekonsekvencoj, en nia komplika tradicia sistemo de la ekzamenoj, tro multaj pro trakti ilin ĉiuj en ĉi mallonga artikolo. Unu tipa ekzemplo devas sufiĉi. En iu lernejo la malpli kapablaj knabinoj elektis la kudradon por la konkludaj ekzamenoj en la jaro 1966. El tiuj 34 knabinoj 33 sukcesis. Kontraŭe, la pli inteligentaj knabinoj elektis alian temon, kia la francan lingvon, matematikon, fizikon aŭ kemion. Tiel estas, kelkfoje ni juĝas sukcesaj la meze kapablajn homojn kaj ne sukcesaj la pli lertajn.

Tion ĉi ĉion ni devas ŝanĝi. La unua reformo en nia eduka sistemo devas esti la forigo de la ekzamenoj.

## Ekonomio kaj edukado

En la ŝtato de Victoria, Australio, proksimume 8.000 el 34.000 instruistoj ne instruas. Ili estas vizitantaj diversajn porinstruistajn seminariojn. Oni devus sendi ĉi tiujn 8.000 instruistojn en la lernejojn, kie oni ilin urĝe bezonas kaj kie oni povus ilin pli efike kapabligi por ilia profesio. Ĉi tiuj 8.000 instruistoj-studentoj duonokupitaj kiel praktikantoj prezentus ekvivalenton de 4.000 plene okupitaj instruistoj. Tiamaniere oni tuj forigus la mankon de instruistoj, la klasoj reduktiĝus je akceptebla nombro kaj oni ŝparus milionojn da dolaroj. La kandidatoj estus mem pli feliĉaj kaj liberigitaj de la laŭkontraktaj kateniĝoj, la lernantoj sentus sin pli komfortaj kaj ricevus pli bonan edukon.

Ekzistas dua kialo de malŝparo en nia sistemo por kvalifiko de instruistoj. Ni trejnas tro multajn inojn kaj ni ricevas tro etan servadon de ili. Knabo-kandidato povas servi por la ŝtato dum 45 jaroj; sed la ŝtato estas bonŝanca ricevi de la knabino 5 jarojn da instruado.

La tria kialo estas, ke ni akceptas la kandidatinojn tro malfrue. Malmultaj kandidatinoj finas sian preparadon antaŭ sia 20-a jaro. Se oni akceptus ilin 16-jaraĝajn, oni havus ilin minimume du jarojn pli longe en la lerneja servado. Inteligenta 17-jara knabino estas tute kapabla sidi kun ses-, sep- aŭ okjaraj infanoj kaj instrui al ili la malmulton, kion ili bezonas lerni. En ĉi tiu pli fruaĝa sistemo oni pli gajnus ol perdis, ĉar dum nunaj kondiĉoj multaj kapablaj knabinoj ne elektas instruistan karieron pro la tro longa prepar-periodo.

La organizaĵoj, kiuj rekomendas pluan plilongigon de la kandidateco estas mio-paj. Kie oni povas preni la necesan monon por ĉi tiu elspezemo escepte per la malaltigo de la salajroj de la instruistaro la haltigo de iliaj postuloj al altigo? Se la instruistaro deziras pli bonajn kondiĉojn kaj pli altajn salajrojn, ĝi devus pli bone pripensi kiamaniere malhelpi la nunan malŝparon de la publika mono en la edukado.

Grava malŝparo okazas ankaŭ en la universitatoj. Ĉi tiuj institucioj edukas dum

malpli ol ses monatoj en la jaro. Se oni forigus la ekzamenojn kaj se la universitatoj laborus dum naŭ monatoj en la jaro (anstataŭ ses monataj), ĉiu stud-unuo povus esti reduktita je unu triono, — ekzemple trijaran studon ni povus redukti al du jaroj. Oni ne plu bezonus limigoj de la nombroj.

Krome la universitatoj aldonis al siaj malfacilaĵoj la absurden altan proprorcion da malsukcesoj. Devus esti neniu malsukcesoj.

Se la ekzameno por la enskribiĝo ĉe la universitatoj ion signifas, ĝi devus garantii seninterrompan trapason de ĉiu akceptita studento tra la universitataj studoj. Okazas male, ke multaj malsukcesas kaj devas repeti iujn jarojn. La nombro de la malsukcesoj parte respondecas al la elbaro de novaj studentoj per kvotoj. Nur reformoj en ĉi tiuj du linioj povus malgrandigi la nombron de la jara studentaro de la universitatoj je preskaŭ duono kaj tamen permesi al granda nombro da studentoj viziti ilin.

En la elementaj kaj duagradaj lernejoj ne estas por la lernantoj edukcele necese resti kvin tagojn semajne en lernejo. Eble oni gajnus la samajn rezultojn per dutaga semajno, sed ni evitu eksciti la konservativajn antaŭjuĝojn de la komunumo kaj ni ekeksperimentu unu jaron per la kvartaga semajno.

Neniu instruisto instruas 40 minutojn en 40-minuta periodo. Verŝajne li instruas nur unu kvinonon kaj la reston de la instruhoro li uzas por praktikado. Ne ekzistas kaŭzo kial parto de la praktikado ne povus esti hejme, eble en pli feliĉaj, pli komfortaj kondiĉoj. Neniu lernanto kapablas lerni solide de la komenco de la lernejtago ĝis la fermaj horoj en la posttagmezo. Inter tiam, devas esti longaj periodoj por ripozo, dum kiuj li povas konsumi la lernitaĵojn, tempo mem estas la plej granda instruisto, — sed malrapida instruisto.

La kvartaga semajno estas praktikata en unu kampara liceo dum 6 jaroj en la abiturienta klaso kaj ĝi bonege funkciis. Studentoj de tiaj klasoj havas nur 32 instruhorojn en la semajno kaj la restantajn horojn ili dediĉas al sporto kaj memstudado. Se la instruhoroj estas dividitaj nur inter kvar tagoj de la semajno, la kvina tago restas kiel studo-tago. En la menciita liceo, oni ebligis al la lernantoj voĉdoni, ĉu ili deziras pasigi sian studotagon en la lernejo aŭ hejme. Ĉiuj egale subtenataj de iliaj gepatroj elektis hejmen studadon. La nombro de sukcesintoj kreskis al 71 kaj 81 procentoj, al la plej altaj ciferoj kiun iam ajn la liceo atingis, kaj kiu alte superis la ŝtatan mezonombron.

Ne ekzistas kaŭzo ne kredi ke ĉi tiu projekto ne povas same bone rezulti en ĉiuj klasoj de la elementaj kaj de la duagradaj lernejoj. Tio signifus malaltigi la ĉiutagan lernejevizitanton je unu kvinono. Anstataŭ havi en la lernejo 500.000 gelernantojn dum kvin tagoj de la semajno, ni havus nur 400.000 gelernantojn dum kvin tagoj de la semajno, ĉiu stud- aŭ klasnivele havante sian apartan studtagon.

Oni devus garantii aranĝojn por tiuj infanoj, kiuj ne povis aŭ ne volis resti hejme, sed tio ne influus materie la projekton. Tiamaniere, oni ne ŝparus la tutan kvinonon de la elspezoj por la edukado, sed estas klare ke la elspezo por tiaj aranĝoj estus multe malpli. Liberigus kaj ejoj kaj instruistoj. La koncernaj lernejoj partoprenus en la divido de la ŝparitaj kostoj kaj tiamaniere ili rebonigus siajn fiancan sanon.

Oni povus uzi parton de la ŝparita mono por garantii edukajn subvenciojn por ĉiuj infano de la ŝtato Victoria.

## Sensenca sistemo de stipendioj

En Aŭstralio, ni ne povas fieri pri nia sistemo de stipendioj, kiu oni prezentas nur etan onon de la monsubteno por edukado, pri kiu oni disponas ekzemple en Anglujo aŭ Skotlando.

La unua stipendio (en 1970), kiun donis la ŝtato, Victoria, estas la "Registara Subula Stipendio", kiun oni disponigis je la fino de la dua studjaro en la duagrada lernejoj kaj ĝi estis jare 12 dolaroj en la tria kaj kvara klasoj, 16 en la kvina, kaj 34 dolaroj en la sesa klaso. La sumo estis destinita por kovri la kostojn por la bezonataj lerno-libroj sed ĝi ne vere egalas la faktajn kostojn. La gepatroj havis tamen la plej grandan ŝarĝon vivteni la gejnulojn dum ilia restado en la lernejo, t.e. ĝis ilia 16-a, 17-a eventuale 18-a jaro.

Oni devas atentigi, ke ekzistis nenia subteno por la lernantoj en la unua kaj dua klasoj kaj ke nur malpli ol triono de la koncernataj gelernantoj ricevis la subtenon.

Ni komparu ĉi tiun sistemon kum la subteno, kiun oni donis en Anglujo kaj en Skotlando, kie ĉiuj gelernantoj de la unua- kaj duagrada lernejoj ricevis senpage la lernolibrojn. Fakte ĉi tiuj landoj tiamaniere donis stipendion al ĉiu lernanto en ĉiuj klasoj. Niaj klopodoj en Aŭstralio aspektas apude tute malsufiĉaj.

Kion ni en Aŭstralio celis per nia sistemo de stipendioj? Ĉu ni klopodis rekompeni la lernantojn por iliaj antaŭaj rezultoj? Certe ne. Ĉu ni provas kuraĝigi la lernantojn daŭrigi la studadon, kuraĝigi tiujn kiuj nenian kuraĝigon bezonis?

Sendube, la origina intenco estis helpi al la familioj kiuj estis malriĉaj kaj havis lertajn infanojn. Eduki ilin por la plibonigo de la ŝtato. Tio ne okazis. La plejmulton de la stipendioj ricevis infanoj el riĉaj, bone sekuritaj hejmoj, kiuj daŭrigus la studadon ricevante stipendion aŭ ne.

Ni elpelu ĉi tiun neracian sistemon kaj ni ĝin anstataŭu per ĝeneralaj edukaj subvencioj kaj por la unugradaj kaj por la duagrada lernejoj, kaj por la ŝtataj kaj por la ne ŝtataj lernejoj.

La federaciaj stipendioj donataj de la aŭstralia registaro pro universitata eniro estas pli grandanime disdonataj, pli nombraj kaj pli monhelpaj, sed la fundamenta manko restas. Ekzemple, multe pli granda procento da studentoj en multekostaj privataj liceoj ricevas la stipendiojn, ol tiu el la ŝtataj liceoj. Krome, ĉe la ŝtataj liceoj mem la procento por la sukcesintaj lernantoj en la urbaj liceoj estas pli alta ol tiu en la provincoj. Ĉi tiu rezulto ŝajnas indiki, ke iam la stipendioj estas distribuitaj, pli laŭ la spertoj kaj kapabloj de la instruistaro, aŭ laŭ la riĉeco de la gepatroj ol pro la kapabloj de la lernantoj.

La nombro de la federaciaj stipendioj por la lernantoj de la 5-a kaj 6-a klasoj estas vere tro modesta. Eble nur unu dekonon de la petskribantoj estas sukcesa, kaj tiu ĉi frakcio povas limiĝi je unu dudekono en la kamparaj liceoj.

Estas nun trista maljusto en la skemo de la federaciaj stipendioj, kiu meritas nian atenton. Edukado en Aŭstralio apartenas en la sferoj de la ŝtatoj kaj la federacia registaro havas neniun rajton enmiksiĝi en la aferojn de la ŝtataj administradoj. La federacia registaro donas stipendiojn al la ŝtatoj ne nur kun la kondiĉo, ke la monsu-

mon oni uzu por la stipendioj, sed ankaŭ ke oni devas uzi ilin, laŭ la rezultoj de ekzamenoj. Oni ne devus kondiĉi la elpagon de mono por edukado je iuj ajn limigoj. La ŝtatoj devus havi la rajton decidi mem pri la stipendioj laŭ bontrovo de siaj fakuloj kiuj povu preferi pli bonan metodon ol ekzamenoj por elekti la stipendiantajn ricevantojn. La ŝtato mem devus konsideri ĉu elpagi la stipendiojn al relative malmultaj aŭ ĉu prefere al multaj studentoj kiel eduka stimulo aŭ kiel porlernila monsubteno.

Simila situacio ekzistas rilate la federacian subvencion por sciencaj laborejoj kaj ekipaĵoj. Sendispute la federacia registaro zorgas ĉi tie pri du aferoj. La unua estas eduki pli da sciencistoj kaj la dua estas gajni partiajn voĉdonojn.

La unuan kaj la pli laŭdindan celon, la federacia registaro komplete mistrafas, elĵetante malŝpare egajn monsumojn. Pri la manko da sciencistoj en nia komuneco ne kulpas la nesufiĉa nombro da ejoj, da ekipaĵoj, da instruistoj aŭ da kapablaj lernantoj mem. Pri ĝi kulpas la arbitra kvoto da malsukcesintoj, kiun la universitatoj senskrupule postulas. Se la universitatoj daŭras postuli de la ekzamenantoj, malsuceson de unu triono da kandidatoj en ĉiu temo kaj en ĉiu jaro, tiam estas egale, ĉu la studentaro estas pli bone aŭ malpli bone instruata. La nombro da sukcesintaj studentoj restos ĉiame la sama.

La dua intenco de la federala registaro estas klare nemorala, komparebla kun la misuzo de trusta fondo. La federala registaro povas reteni tiom da mono el la impostoj kiujn ni, la popolo, pagas por balanci sian buĝeton per nesufiĉaj monaj donajoj al la ŝtatoj. Tion ni povas rimarki en la eduka kampo, en kiu mono daŭre mankas en la ŝtatoj, dum ĉe la federacio ĝi abundas. La asigno de plua mono por edukado, eĉ speciala celo estas konfeso de la federacio pri la nesufiĉa origina asigno.

La impost-kompetenco devus esti redonita al la ŝtatoj. Ili devus esti repondecaj pri la kolektado de mono per impostoj, kaj pri la elspezo de tiu mono. Perfekta financa kontrolo estas la unua neceseco por iu ajn reigistaro. Sen tio ĉiu registaro estas nur pupa registaro.

Kaj tamen, nia eduka sistemo malŝpare elĵetas monon. Nek la registaro nek la gepatroj povas ĝin monumi kontentige.

## Dua lingvo

La lernejoj en nia eduka sistemo havas tri motivojn. La unua estas la edukado; la dua estas la instruado de la ĝeneralaj kaj de la specialaj kapabloj necesaj en nia ordinara vivo; kaj la tria estas nur kontroli.

Kion oni intencas per la enkonduko de la dua lingvo en la lernejan planon? Origine la akiro de la kapablo legi kaj paroli latine apartenis al la bazaj scioj, ĉar ĉiuj scioj en la tiama mondo estis serĉeblaj nur en latinaj libroj. Sed kiam la praktikaj edukistoj havis la ideon traduki tiujn librojn en la naciajn lingvojn kaj efektivigis tion eĉ kontraŭ la plej forta opozicio, la scio de la latina lingvo fariĝis supreflua kapableco.

Kiam ĝi estis forigita el la lernejoj por esti anstataŭigita per iu ajn moderna dua lingvo, oni nur ŝanĝis unu necesan kapablecon per alia.

Malgrandaj nacioj estas pro la circonstancoj devigataj lerni la lingvojn de la grandaj nacioj, sed ekzistas pro la anglaparolantaj popoloj neniu bezono lerni iun fremdan lingvon. Ĉar ni zorgas pri la eduko de la plimulto, ni povas ĝenerale ignori la malmultajn kiuj eble bezonas sciojn pri aliaj lingvoj en diplomatio, komerco, filologio k.t.p. Ĝenerale en niaj lernejoj ni nur lernas duan lingvon por instrui aliajn kiuj ĝin same lernas nur por instrui aliajn kaj tre malofte aŭ neniam ĝin uzas alie.

La dua lingvo estas la plej malfacila kaj la plej ne necesa temo inter ĉiuj niaj liceaj temoj. Ĝi postulas egan memorkapablon kiun la plej multaj de niaj studentoj ne havas. Ekzemple, en niaj liceoj ni instruis la francan dum la lastaj sesdek jaroj, eble tri horojn ĉiutage, sed hodiaŭ, malpli ol unu procento de la aŭstralia popolo estas kompetenta en la franca. Ni malŝparis nian tempon, nian monon kaj nian energion en ĉi tiu afero.

Ĝi ankaŭ ne estas taŭga studobjekto por la tria celo de niaj eduka sistemo — por kontroli la infanojn, ĉar la studentoj plibone kondukus se ili farus ion, kion ili kapablas fari, kaj interesiĝas pri ĝi.

Tiel ni konkludas ke la celo de nia instruado de la dua lingvo pro ĝia kultura valoro. Ni estu sinceraj. Ĝi havas neniun edukan aŭ kulturalan valoron. Nenia kultura valoro troviĝas en la lernado de longaj listoj da vortoj aŭ de la diversaj neregulaj verboj, aŭ de ĉiuj gramatikaj kaj prononcaj esceptoj, ktp. La kulturo ne venas de la vortoj, sed de la ideoj malantaŭ la vortoj. Ĝi venas el la interago de la ideoj inter homo kaj homo, el pli bona kompreno de la arto vivi, kaj de la akiro de scioj, kiuj helpas tiun komprenon. Nenia kulturo aŭ evoluo venas de lingvo-lernado, se oni ne atingas tian majstrecon, ke oni povas facile per ĝi paroli aŭ legi. Nur tre malmultaj, certe malpli ol unu procento, atingas tian nivelon. En niaj aŭstraliaj lernejoj ni devas elbari la duan nacian lingvon kaj pli bone uzi nian edukan tempon. Se oni vere sukcesas lerni unu alian lingvon, ekzemple la francan, tio malfermus por li nur unu nacian pordon, la francan pordon.

Ĉiuj aliaj pordoj — la germana, hispana, rusa, aziaj, restus tute fermitaj. Oni povus komuniki nur kun la popolo de unu lando sed ne kun la popoloj de iu ajn mondparto. Kiom malgranda profito por tiom da ega klopodo!

Kion oni klare bezonas estas dua lingvo sed universala lingvo, — simpla sed kompleta kaj neŭtrala. Ekzistas tia lingvo — la universala lingvo Esperanto. Simpla, klara, belsona, Esperanto estas la vera solvo de la tutmonda lingva problemo. La scio de tia universala lingvo estus ne nur tre utila lingvo (ekzemple por komerco, veturado, komunikado) sed ĝi havus kulturalan valoron, kiun la naciaj lingvoj ne posedas, aŭ nur iomete posedas. Ni povus en nekomperebla skalo vastigi niajn homajn kontaktojn; ni povus nekalkuleble multigi la interŝanĝon de ideoj.

Tamen niaj edukistoj time hezitas ĉe tiu klara paŝo al riĉigo de niaj vivoj, al pli bona interkomprenado de niaj kunhomoj, al progresigo en paca kunekzistado, al pli granda komforto por vojaĝado kaj oportuneco en komerco.

## Bildkarta instru-ludo

La celo de la bildkarta instru-ludo estas instrui Esperanton helpe de ilustraĵoj sur bildkarto. Ĉar preskaŭ ĉiu korespondema esperantisto jam havas kolekton da koloraj bildkarto de diversaj partoj de la mondo, instrumaterialo estas facile havebla. La kursgvidanto devas akiri sufiĉe grandan kvanton da bildkarto, prunteprenante ilin de membroj de la loka grupo, se li mem ne havas sian propran kolekton. Li zorge elektas dudekon de la plej taŭgaj karto por ĉiu temo, kiun li intencas instrui. Surbaze de tiu kartaro, li planas lecionojn, kiuj ampleksas la instruadon de vortoj kaj esprimoj bezonataj por paroli pri la enhavo de la bildoj sur la karto.

Ĉe la komenco de la kurshoro, la karto estas metitaj sur tabulon, tiel ke la bildflankoj estas videblaj al ĉiuj lernantoj, kaj ne estas eble legi la flankojn kun skribo kaj poŝtmarkoj. Apud ĉiu karto estas numeroj de 1 ĝis 20. Ĉe la plej elementa nivelo, la leciono temas pri urboj kaj landoj, kaj priskribo de iliaj geografia situo, industrioj, transportrimedoj, famaj konstruaĵoj, historiaj kaj artaj monumentoj ks.

---

Kelkaj interesaj helpaĵoj por nia Esperanto-instruado: B. Golden rakontas pri, "Bildkarta Instru-Ludo" (cetere li estas tiu samideano, kiu regule riĉigas IPR-on: bonega kunlaboranto!). Lia artikolo sendube donos la necesajn spicojn por vigla studhoru.

A. Spencer raportas pri sia kurslaboro kaj rekomendas efikan kursmaterialon.

Multajn lingvojn kaj unu skribo: neniaj fonetikaj problemoj! Vi kapablos skribi ĉiun lingvon — eĉ sen lumo!

En IPR 81/2 komenciĝos serio pri la "Kiel" kaj la signifo. Verkos: Mirko Macetta.



Dum la prezentado de la leciono la instruanto daŭre montras al la bildoj ilustrantaj la pritrakitajn lokojn kaj objektojn (ekzemple strato, parko, haveno, muzeo, stacidomo, aŭtobuso, statuo ktp.) sed li ne diras la nomojn de la urboj kaj landoj.

Ĉe la fino de la leciono, ĉiu lernanto ricevas paperfoliojn kun dudek numeritaj linioj en du kolumnoj. Oni devas identigi la urbon, el kiu venis ĉiu bildkarto, kaj skribi ankaŭ la nomon de la lando. La kursestro helpas la identigon, dirante unu aŭ du frazojn pri ĉiu urbo, sed ne laŭ la vicordo de la kartoj sur la tabulo (ekzemple "Roterdamo estas la plej granda havenurbo en la mondo laŭ la kvanto de sia komerco."). Fakte, la divenado povas sukcesi eĉ sen la klarigo de la instruanto, ĉar oni kelkfoje povas rekoni urbojn laŭ arkitekturaj, geografiaj aŭ aliaj trajtoj.

Pluraj variaĵoj de la bildkarta instru-ludo estas eblaj, kaj lerta kursgvidanto povas adapti ĝin al la lingvonivelo kaj interesiĝo de siaj kursanoj. Krom la uzo de heterogena kartaro kaj ĝeneralaj demandoj, estas eble limigi la lecionon al specifa temo, ekzemple la Esperanto-movado. Estas elektendaj, do, kartoj de dudeko da urboj, kiuj rolis aŭ rolas en la historio de Esperanto kiel kongresurbo, naskiĝloko de eminenta esperantisto, eldonloko de fama periodaĵo, ks. En sia leciono, la instruanto donas al la lernantoj bazajn sciigojn pri la Esperanto-movado. En tiu ĉi variaĵo, la paperfolioj disdonitaj al la lernantoj havas tri kolumnojn anstataŭ du por skribi la nomon de la urbo, ties landon kaj ankaŭ kelkajn vortojn pri la graveco de la loko en Esperantujo. Kiam la paperfolioj estas plenigitaj, ĉiu kursano interŝanĝas sian kontraŭ tiu de sia najbaro por korektado. La instruanto identigas la bildkartojn kaj denove informas pri la graveco de la urboj. Tiel, okazas trifoja ripeto de la sama lingvomaterialo, unue dum la klariga parto de la leciono, due, kiam la instruanto diras frazon pri ĉiu urbo, kaj trie, kiam li ripetas tiujn frazojn por identigi la urbojn dum la korektado de la respondoj. Cetere, kelkaj vortoj kaj esprimoj estas eĉ pli ofte ripetitaj pro la limigita naturo de la temo.

Per plisimpligo de la lingvouzo, la instrukarta ludo taŭgas ankaŭ por la instruado de Esperanto al infanoj. En kursoj por progresintoj, la kartoj povas esti elektitaj laŭ temoj postulantaj pli detalajn informojn pri la enhavo de la bildoj. La plej utila variaĵo estas la uzo de la bildkartaro por konversacia praktiko. Ĉiu lernanto ricevas karton, kaj li rajtas scii la nomon de la urbo, de kie ĝi venis. Li montras la karton al siaj samkursanoj, samtempe aldonante sciindaĵojn pri la urbo kaj lando. La aliaj kursanoj faras demandojn por ricevi pli da informoj, kaj la unua, kiu divenas la nomon de la urbo, ricevas la karton. Oni daŭrigas laŭvice ĝis ĉiu kursano prezentas sian urbon. Kiu sukcesas kolekti la plej grandan kvanton da kartoj estas la gajninto. En tiu ĉi variaĵo, la rolo de la instruanto estas pasiva; li helpas nur, kiam vorto aŭ esprimo estas bezonata de siaj lernantoj. La bildkartoj mem paroligas la kursanojn.

La bildkarta instru-ludo estas uzebla ankaŭ dum klubkunvenoj, kies celo estas pli distra ol didaktika. Oni simple eliminis la unuan parton, la lecionon. La kluba programgvidanto, transprenante la rolon de la instruanto, komencas la ludon per mallongaj klarigoj pri la bildkartaj urboj. La grupano, kiu sukcesas ĝuste identigi la plej grandan nombron da urboj, fariĝas la gajninto kaj povas ricevi premion.

**Bernard Golden**

## Baza kurzo el Aŭstralio

Estas mia plezuro skribi al vi denove. Temas pri 4, 5 kaj 6 punktoj sur paĝo 61 en *n-ro 3, 1980 de IPR*.

Bonvolu ke mi prezentu mian sperton pri la uzado de nova kurso: "Baza Kurso en Esperanto".

*Punkto 4* — kia metodo (rekta aŭ nereakta):

- a. "Baza Kurso en Esperanto" estas *rekta metodo*.
- b. Estas "Cseh Metodo Kurso" kun teksto modernigita (de Audrey-Childs Mee).

*Punkto 5* — instruiloj (kiaj, kaj kiu stoko jam ekzistas)...

- a. La plej necesa instruilo estas la bild-gvidlibro speciale adaptita por la "Baza Kurso en Esperanto".
- b. "Modelo de Hejmtasko" (fine de ĉiu leciono)
- c. "Modelo de Ekzameno" (taŭga por studintoj de Baza kurso en Esperanto)

*Punkto 6* — Ĉiu gvidilo estas havebla ĉe... "La Moderna Lingvo Centro." (Audrey kaj Lorenzo Childs Mee, van Heusdestraat 88, Rotterdam-6 Nederlando.

Uzante tiun kurson, mi trovis ĝin tre helpema por la instruanto pere de la kursgvidlibro, kiun oni uzas tra la 15 lecionoj, kaj kies bildojn la gejunuloj tre ŝatas kraĵone desegni.

Ankaŭ helpema estas la "Modelo de Hejmtasko" fine de ĉiu leciono, por ke la kursgvidanto kopiu, multobligu kaj disdonu al siaj lernantoj.

Kaj la "Modelo de Ekzameno" atingebla el la Lingva Centro kontraŭ malalta prezo.

Mi uzis la "Baza Kurso en Esperanto" dum mi instruis la komencantojn en la Somera Lernejo en Dowlands Kolegio. Jan 1981. Post nur dek tagoj le lernantoj povis parkere rakonti kun mimikoj 10-minutan paroladon — kaj poste, agi kiel instruanto tra la korelativoj, demandanta unu la alian.

Tio liveris elokventan ateston al la Esperantoj el ĉiu parto de Aŭstralio (33) kiuj aŭskultis, ke tiu kurso certe havas efektivan rezulton.

**Annie Spencer**

## Nelastaj vortoj pri la supersignoj

### Oficiala komunikado de la Akademio

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobado diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniu ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: “Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ, povas anstataŭ ili uzi, ch, gh, hh, jh, sh, u”.

Oktobro 1980

Prezidanto: **W. Auld**  
Sekretario: **D-ro A. Goodheir**

IPR akceptis en n-ro 1, 1980 pp. 18/20 artikolon de prof. Ives Guéguénat pri “Ni parolu pri faktoj”. Tute intence! La reagoj estis ja unufoje en la IPR-historio fantastaj. Tute egale — ĝis nun — kion IPR prezentis — ĉiam sekvis silento.

Sed nun alvenis leteroj jesaj kaj neaj — protestaj/konsentaj, ekz.: Mi estas ŝokita, ke IPR okupiĝas per tia jam finita afero!”

IPR prezentas nun tri kontribuojn:

unu estas oficiala de la Akademio

dua estas de B. Golden (Hungario)

kaj tria sub la sama titolo (Ni parolu pri faktoj) de E. Geraldis de Carvalho (Brazilo).

En la stoko de la redaktoro estas ankaŭ aliaj opinioj.

Ĉu ni legu pluajn?

La du supersignoj en nia lingvo: kaj certe ne estas la baro por rekonigi Esperanton!

## OEO kaj ni

Dum la pasinta jaro plurfoje aperis en Esperantaj periodaĵoj jena anonceto:

“*La Optimale Modernigita Esperanto-ortografio ebligas tajpi nian lingvon sur ĉiuj latinlingvaj skribmaŝinoj, kompostmaŝinoj kaj komputoroj tm! Inf. OEO, 24 av. Riedisheim, F-68100 Mulhouse, Francio*”.

La inicialoj OEO signifas “Optimala Esperanto-Ortografio” kaj ĉe la indikita adreso loĝas Albert Lienhardt, emerita fervoja inĝeniero, delegito kaj fakdelegito de UEA (lingva kontrolo de manuskriptoj). Li estas la aŭtoro de unu el la plej novebakitaj reformproponoj por “plibonigi” Esperanton.

Pri kio temas Optimala Esperanto-Ortografio? En siaj propagandaĵoj s-ro Lienhardt ĝistede elbuŝigas la malnovan rekantaĵon pri la malutilo de la supersignitaj literoj en la Esperanta alfabeto, argumentante, ke se ili ne ekzistus, tiam pli da homoj volonte lernus la lingvon, kaj sekve, oni vastskale uzus ĝin, eldonus pli da verkoj en ĝi kaj, finfine, eĉ oficialigus ĝin.

Se oni ekzamenas profunde kaj objektivite la demandojn pri supersignoj en Esperanto, oni povas lerni interesan lecionon. Ekde la apero de la zamenhofa lingvo, leviĝis protestoj kontraŭ tiuj liter-distingiloj. Ortografiaj reformprojektoj venis kaj iris kiel la vento, kaj neniu el ili havis eĉ la plej malgrandan efikon sur la klasikan Esperanton. La argumentoj kontraŭ la uzo de diakritaj signoj en Esperanto estas tute senbazaj, mi legis leteron al la redakcio de itala ĵurnalo, en kiu la skribinto opiniis Esperanton netaŭga por moderna uzo, ĉar ne estas eble telegrafi tekstojn kun supersignitaj literoj. Sensencaĵo! Pluraj eŭropaj lingvoj havas literojn kun kromsignoj, sed la telegrafistoj facile povas elturniĝi helpe de digramoj. Same kiel en la germana lingvo “ae” kaj “oe” anstataŭas la literojn “ä” kaj “ö” kun dupunkta supersigno, simila solvo en Esperanto estis elpensita kaj pritraktita jam dum unuaj Universalaj Kongresoj: oni uzas “h” anstataŭ la cirkumfleksio. Kiel ofte okazas, obstakloj troviĝas nur en la cerboj de etmensuloj, ne en la realo.

Eble la plej science bazita kritiko de la uzo de supersignoj estis tiu de d-ro É. Javal, samprofesiulo de Zamenhof. Li metis sin en la avanon de la probatalantoj, kiuj celis elimini la tegmentitajn literojn, ĉar laŭ lia teorio, tiaj literoj okazigas plian streĉiĝon de la leg-organoj. Eĉ tiu klarigo ne estis sufiĉe konvinka, ĉar kvankam Zamenhof legis la verkon de sia kolego, *Fiziologio de la legado kaj skribado*, tamen li ne akceptis la rekonojn de la franca okulisto pri ortografiaj reformoj en Esperanto. Kaj la aŭtoro de Esperanto rifuzis ankaŭ la allogan mongarantion de 250000 francoj proponitan de Javal kaj lia peranto, la belga majoro Charles Lemaire, kondiĉe, ke reformoj estu enkondukitaj en Esperanton.

En la 92-jara historio de Esperanto, ĉiuj proponoj por reformoj, sen iu ajn escepto, fiaskis, dank’ al la komnua saĝeco de la esperantistaro, kiu ne permesis, ke ling-

vaj plibonigistoj tuŝaĉu ilian lingvon. Laŭ mia scio, estas nur unu solvo, kiun la reformemuloj ankoraŭ ne elpensis: la forigo de ĉiuj literoj de la Esperanta alfabeto, por ke restu nur la supersignoj! Ankaŭ la reformsistemo ellaborita de s-ro Lienhardt estas destinita trafi en la abismon de forgeso, ju pli frue, des pli bone.

Erara estas lia aserto, ke la ĉapelitaj literoj faras Esperantlingvan presadon kaj eldonadon malpraktika kaj malekonomia. Sur miaj librobretoj staras malnovaj verkoj en Esperanto kun la kolofonoj de prestiĝaj neesperantistaj eldonejoj: Hachette (Parizo), Stead's Publishing House kaj Thomas Nelson and Sons (Londono), Fleming H. Revell (Nov-Jorko). Hodiaŭ novaj eldonejoj pluportas la torĉon kaj publikigas librojn en Esperanto: The English Universities Press kaj University Tutorial Press (Londono), Presses Universitaires de France kaj Assimil (Parizo), Corvina (Budapeŝto), E. P. Dutton (Nov-Jorko). Lastatempe aliĝis Oxford University Press (Oksfordo). Tiuj gravaj mondkonataj firmaoj ne elspezas monon por akiri supersignitajn litertipojn cele al la idealisma subteno de Esperanto. Ili estas konkurencaj komercaj entreprenoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto nur, ĉar ekzistas ebleco ricevi profiton per la eldonado de Esperantaj publikigaĵoj. Kaj pro la sama kristalklara kialo ili ne eldonas librojn en Ido, Occidental, Interlingua aŭ iu ajn alia planlingvo jam kuŝanta en la rubkorbo aŭ survoje tien. Plue, kiam presejoj kaj fabrikoj de tajpiloj kaj kompostmaŝinoj trovas, ke ekzistas merkato por aparatoj havantaj la Esperantan alfabeton, ili senhezite provizas la klavarojn de siaj maŝinoj per la bezonataj literoj. Ankaŭ venos la tempo, kiam organizaĵoj kaj oficialaj instancoj, enretiĝinte en la nuntempa lingva ĥaoso, devos konstati, ke la dungado de armeo da interpretistoj kaj tradukistoj, kaj la perdo de tempo pro lingvaj malfacilaĵoj estas pli multekostaj ol la adopto de la Internacia Lingvo, eĉ se komence estiĝas relative grandaj elspezoj por lingvo-instruado kaj modifo de preseja ekipaĵo. Ĉiu nova inventaĵo kaj procedo havas similan historion.

Pro la mutnombraj publikigaĵoj kaj artikoloj, kiujn s-ro Lienhardt eldonis kaj dissendis dum la pasinta duonjardeko, estas evidente, ke li havas materiajn rimedojn por subteni sian kampanjon, sed ĝis kiu limo? Jam montriĝis per la malfavoraj recenzoj, kiujn ricevis OEO en la Esperanto-gazetaro, ke ĝi estas kondamnita al malsukceso kaj neniam ŝancelos la Fundamenton. Povas esti, ke Lienhardt allogos kelkajn malkontentulojn, kiuj ĉiam ekzistas en Esperantujo, sed neniam okazos amasa akcepto de OEO. Ĉu ni, do, kun rideto kaj mansvingo malokupiĝu pri tiu reformprojekto? Ne! Tute male, estas necese energie kontraŭagi.

Se estontece okazos oficiala pritrakto de la internacilingva demando por eventuale elekti la Internacia Lingvon, la aŭdigo de eĉ unu febla sed misharmonia voĉo inter la esperantistoj, proponanta reformojn, sufiĉos por estigi dubon pri la taŭgeco de Esperanto. Estas nekredeble, ke post naŭ jardekoj da mortnaskintaj reformprojektoj, ankoraŭ troviĝas homoj, kies horizonto estas tiel malvasta, ke ili ne komprenas, aŭ ne volas kompreni, ke la fina, oficiala decido pri alpreno de internacia lingvo ne baziĝos sur ties ortografiaj trajtoj, sed dependos de sociopolitikaj faktoroj.

Post la naskiĝo de Esperanto, aperis pluraj "plibonigitaj" kaj "pli perfektaj" planlingvaj skemoj, sed nek la publiko nek oficialaj instancoj montris pli da interesiĝo pri ili, kaj tute mankis deziro subteni tiujn novajn internaciajn lingvojn. Eĉ ne

unu el ili atingis la nivelon de Esperanto dum komparebla periodo de ekzisto. La kialo de la daŭra ignoro de tiuj lingvoj — kaj estas necese emfazi, ke ili *ne* havas supersignitajn literojn — estas la rifuzo fare de decidpovaj potencoj en la mondo akcepti internacian lingvon, kiu devigos ilin fordoni la privilegian pozicion de politika, ekonomia kaj kultura supereco, kiun havas, ĉar *iliaj* naciaj lingvoj estas uzataj en internaciaj rilatoj. Kiu konas la historion de la klopodoj prezenti Esperanton al la Ligo de Nacioj dum la 1920-aj jaroj, memoros, ke la afero fiaskis, ne pro iaj difektoj en Esperanto mem — ne sonis eĉ unu pepaĵo pri supersignoj — sed pro la kontraŭstaro de france-parolantaj lingvaj ŝovinistoj. Hodiaŭ similaj sociopolitikaj sintenoj malantaŭ la kulisoj en UNO kaj UNESKO silentigas ĉiujn proponojn solvi la Babel-problemon per internacia lingvo.

Necesas atentigi la publikon pri ankoraŭ unu misinformo en la propagando de Lienhardt. La naturalisma planlingvo konata kiel Interlingua (IALA), sen supersignitaj literoj, estas tre malforta rivalo kontraŭ Esperanto nuntempe. Ĝi nek kreskas, nek akiras pli da adeptoj en intelektulaj rondoj, sed tute kontraŭe, jam de jaroj vegetas, kaj baldaŭ formalaperos. Estas malfacile kompreni, kial Lienhardt kaj aliaj esperantistoj lasas sin trompi per la troiga propagando de la adeptoj de Interlingua.

Laŭ la titolo de tiu ĉi artikolo, ĝi ne enhavas la plej lastajn vortojn pri la supersigniga demando. Post OEO certe venos ankoraŭ pli novaj (aŭ malnovaj) proponoj, kiujn la prudenta esperantista popolo daŭre ignoras.

**Bernard Golden**

## La lasta verko de **Tibor Sekelj** Mondo de aventuroj

30 rakontoj de vera  
vivo en simpla stilo.  
Nova legaĵo por  
viaj lernantoj:

9.600 liroj = 20 gld. + 10% sendokostoj  
312 paĝoj, 21 cm., ilustrita per 24 fotoj.  
EDISTUDIO, CP 213, I-56100 PISA, ITALUJO  
Pĉk 12230561 — 1/3 rabato por kvantaj mendoj

## “Ni parolu pri faktoj!”

*Pri la artikolo kiu havas la supran titolon, publikigita en IPR n.º 1, 1980, pp. 18/20, mi opinias, kun respekto al Prof.ro Ives Guéguéniat, laŭ numere:*

1. Antaŭtempe niaj domoj havis nur kerozenan lumon; hodiaŭ ili havas elektran lumon. La aŭtomobiloj havis nur vergobremilojn; hodiaŭ ili havas oleobremilojn. La televidaparatoj havis nur blankan kaj nigran kolorojn; hodiaŭ ili havas ĉiajn kolorojn. La propraj skribmaŝinoj, antaŭtempe, estis manludataj; hodiaŭ ili estas motorludataj. Tiaj faktoj ĉiam okazis, okazas kaj okazos. La tri kvaronoj da ĉiuj latinliteraj skribmaŝinoj nuntempe vendataj kaj uzataj devos posedi cirkumflekson kaj aliajn por solvi siajn situaciojn. La demandon mi respondas: — jes, en la nuna epoko, Esperanto (kiu propredirante ne estas artefarita lingvo, ĉar ĝi sin bazas sur naciaj lingvoj), ankoraŭ ne tute ĝustamaniere tajpebla per 75% el la milionoj da ekzistantaj latinliteraj skribmaŝinoj povas ambicii ludi la rolon de universala lingvo internacia. Krome, oni povas diri ke Esperanto ne estas kreita nur por popoloj kiuj skribas latinlitere, sed ankaŭ por aliaj.

2. Oni povas demandi: kiu homa plano ne estis ankoraŭ ŝanĝita? Krom tio, la unua respondo miaopinie solvas ankaŭ ĉi tiun demandon.

3. Ankaŭ, mi opinie, la unua respondo solvas ĉi tiun demandon. Krom tio, oni povas diri ke antaŭe la presmaŝinoj ne estis linotipaj, nek ofsetaj, nek kolorpresaj. Hodiaŭ ili estas tiaj. Morgaŭ ili estos sufiĉe supersignaj.

4. En Esperanto la supersignoj apartenas al la literoj; ne al la vortoj. Tiel, ekzemple, la supersignoj de “ĝ” kaj de “ŭ” havas la saman vivkondiĉojn de la punkteto de “i”. Pere de nur unu klavtuŝo oni skribas “ĝ”, aŭ “ŭ”, aŭ “i”. Se oni skribas la literon “i” (kun punkteto) pere de unu klavo, oni povas skribi ankaŭ la literon “ĝ” (kun cirkumflekso), ktp. Ne ekzistas en Esperanto supersignado; oni ne demandas: ĉu ĉi tiu vorto havas aŭ ne havas supersignon? Do, la unua respondo, miaopinie, solvas ankaŭ ĉi tiun demandon. En la portugala lingvo, ekzemple, kaj ene en aliaj, okazas kontraŭe: la supersignoj apartenas al la vortoj; ne al la literoj. Tiel, ekzemple, la supersignoj de “têmpera” (hardo) kaj de “mão” (mano), ne havas la saman vivkondiĉojn de “i”, nek inter si. Pere de du klavoj (ne de unu) oni skribas la duon “ê” aŭ “ã”: oni tajpas la klavon “~”, poste, la “e”, kaj oni havas la duon “ê”; simile “~”, post, kaj oni havas la duon “ã”. Ekzistas en la portugala lingvo supersignado; oni demandas: ĉu ĉi tiu vorto havas aŭ ne havas supersignon? Se oni volas skribi, ekzemple, la vorton “têmpera” (hardo), oni devas scii ke la silabo “têm” estas pli forte akcentita, kaj ke ekzistas portugala gramatika regulo kiu diras ke kiam la tria silabo de maldekstre estas pli forte akcentita, kaj kies vokalo havas fermantan sonon, ricevas cirkumflekson. Kiuj scias la regulon cirkumfleksas la vorton, kiuj ne scias ne cirkumfleksas. Se oni volas skribi, ekzemple, la vorton “tempera” (oni spicas), oni devas scii ke ĝia silabo “pe” estas pli forte akcentita, kaj ke ekzi-

stas portugala gramatika regulo kiu diras, ke kiam la dua silabo de maldekstre estas pli forte akcentita, la vorto ne ricevas supersignon. Kiu scias la regulon ne supersignas la vorton, kiuj ne scias povas okaze supersigni. Supersignante aŭ ne supersignante, ne okazas dubo ĉar la frazo donas la sencon al la vorto. ekzemple, oni skribas: “La ‘tempera’ plibonigas la glavon.” La vorto estas sen supersigno, sed neniu pensas ke ĝia senco estas “oni spicas”, ĉar la frazo tiel ne havus sencon. Do, supersignante aŭ ne supersignante la vortojn la efiko estas preskaŭ la sama. Do, supersignoj povas esti eĉ ne tajpeblaj, en aliaj lingvoj; ne en Esperanto.

5. Oni devas rimarki ke Zamenhof apenaŭ proponis helpi regulon; li ne proponis modifon. Miaopinie li diris tion pro la multnombraj baroj de li renkontitaj kaj de li plurfoje cititaj. Miaopinie li volis cedi iom antaŭ tiom da obstakloj. La propra artikolo atestas la nekonvenon de tiu propono. Krome tio, se ankoraŭ en la presejoj mankas kelkaj klavoj, la unua respondo solvas la demandon.

6. Tio estas alia bato kontraŭ tio kio estas ankoraŭ ne ebla al la homoj: ia ajn modifo en la bazo de Esperanto. La propra artikolo diras pri la netaŭgeco de tiuj proponoj.

7. La motivoj de tiu publikaĵo certe estas la samaj cititaj en nia n° 5: baroj, obstakloj, cedioj. La propra artikolo diras ke la reformopropo estis malakceptita de 157 personoj kontraŭ 97. Mia opinie ankoraŭ daŭras tia kontraŭreformista spirito. La unua respondo solvas ankaŭ tiun demandon.

8. Esperanto havas sian nedependecan naturon kaj ĝi ne estas kreita nur por latinliteraj lingvoj. Simboloj kaj terminoj povas ŝanĝiĝi. Ankoraŭ “certaj latinliteraj nomoj ne esperantigeblaj” ne rajtas ke internacia lingvo, devige, ilin atentu. Esperanto, certe kaj kompreneble, ne atentis ankaŭ aliajn certajn aliajn nelatinliterajn nomojn.

9. La propono de 1978 jam malproksimiĝas de sia propra naskiĝo. Ĝi nun estas dujaraĝa; baldaŭ ĝi estos kvarjaraĝa, kaj certe havos la saman sorton kiel la propono de 1894. Tiu propono de 1978 estas farita surbaze de iu difinita lingvo nacia; tiel, tiu fakto estas malsimpatia kaj malakceptebla.

10. Mi opinios tute kontraŭe. La ŝtatoj en la latinlitera lingvo-hemisfero ne rifuzos agnoski Esperanton senfine. Esperanto estas utilaĵo, kaj tiel, pli aŭ malpli frue, ĝi estos agnoskita. Oni ne miru pri tia homa inerteco, tia homa rutino. Eĉ utilaĵoj pli materiaj, kiel, ekzemple, la metra sistemo, pli malnova ol Esperanto, ĝis hodiaŭ estas ankoraŭ ne tutmonde uzata, kaj mirinde, de nacioj de la latinlitera lingvo-hemisfero. Denove oni diru ke Esperanto ne estis kreita nur por latinliteraj popoloj. Esperanto estas tio, kio ĝi estas. Oni ne modifu ĝin pensante ke tiel ĝi estos pli facile agnoskata. Esperanto, kiel la propra nomo diras, ne bezonas urĝi multe; la homaro ĝin bezonas kaj ĝin serĉos. Ĝis tiam, ni laboru sen ĝin modifi, ĉar kiu ĝin kreis estis genio lingva. Fine ni atingos la sukceson deziratan de ni ĉiuj, kiel diras la artikolo.

**Euclides Geraldis De Carvalho**

Rua 13 de Maio, 20-30  
Cep 17.100 — Bauru — SP — Brazilo

Se vi absolute ankoraŭ ne scias, kion fari dum viaj ferioj, iru al Gresillon!  
Jen la programo.

## Esperantista Kulturdomo

Kastelo Grésillon F-49150 Baugé  
Poŝtkonto: Nantes 1485 39P  
Telefono:  
dum la aranĝoj (41) 8910343  
ekster la aranĝoj (40) 767795

## Kulturaj aranĝoj 1981

### Printempo:

alveno Dimanĉon 29an de Marto posttagmeze, foriro Dimanĉon 5an de Aprilo matene

- Renkonto de infanoj
- Praktika pedagogio

### Somero:

#### UNUA PERIODO

alveno Ĵaŭdon 2an de Julio — foriro Merkredon 22an de Julio

- Prelegoj diverstemaj
- diskutoj pri la prelegoj
- Studado de la lingvo
- Malkovro de la regiono

#### DUA PERIODO

alveno Ĵaŭdon 23an de Julio — foriro Merkredon 12an de Aŭgusto

- Rektmetodaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj
- Studado de la lingvo (tradukado, studado de verkaĵo, gramatiko...)
- Manlaboroj
- Malkovro de la regiono

#### TRIA PERIODO

alveno Ĵaŭdon 13an de Aŭgusto — foriro Merkredon 2an de Septembro

- Studado kaj praktiko de la lingvo
- Seminario pri rektmetoda instruado de Esperanto
- Manlaboroj kaj artlaboroj
- Malkovro de la regiono

*N.B.:* Sesioj de ekzamenoj estos organizitaj, kvankam la celo de la kursoj ne estas precize la preparado de tiuj ekzamenoj.

## 15-a ILEI-konferenco

11-a ĝis 21-a de Julio 1981

Gödöllő, Hungarujo.

La estraro de ILEI bedaŭras, ke la Ligo praktike nur nun en Februaro 1981 povas inviti la membrojn.

Kial? Nun, vidu! Jam en Malto — dum nia konferenco — ni decidis konferenci en Hungario kaj havis la unuan kontakton kun juna studentino el Hungario, partoprenantino de la konferenco. Antaŭvidite estis la 18-a ĝis 25-a de Julio en Gödöllő.

La respondo venis de HEA la 5-an de Novembro 1980. Vidu la leteron!

La maksimumaj kostoj por Gyulo estis nur 2000 forintoj en la kadro de la Some-ra Esperanto-Universitato.

Notinde estas, ke estis postulataj nur forintoj! Bedaŭrinde la dato ne konvenis (5-11 de Julio) pro la troa fruo. En niaj landoj multaj lernejoj ankoraŭ ne havos feriojn. Krome HEA intencis disponigi al ni plurajn domojn (studentaj domoj, hotelo). ILEI devis rezigni.

Subite tamen Gödöllő — sed en tute nova vesto: bonvolu legi mem.

La estraro de ILEI submetis sin al la kondiĉoj de HEA — ĉar ne ekzistis iu alternativo pere de alia sekcio. Do, partoprenu nian konferencon, niaj hungaraj geamikoj kore invitas vin.

Ĉar ILEI devas mem zorgi pri ĉiuj administrataj laboroj en la nesocialismaj landoj! Jam ekestis kaj daŭrigos sentebraj kostoj — kaj iom devos resti por nia ILEI-kaso — la realaj kotizoj estos analoge 320, 270, 220 kaj 110 guldenoj. Uzu la aliĝilon, je paĝoj 28-28, sed ankaŭ nia vicprezidento, sinjoro Ingusz, havigos ilin al vi.

Al S-roj Helmut Sonnabend prezidanto kaj Mario Dazzini ĝenerala sekretario de ILEI

Estimataj,

Mi petas vian pardonon pro la neĝustatempa respondo, sed ĝis nun ni devis marĉandi por certigi la kondiĉojn por ILEI Konferenco 1981 en nia lando.

Finfine ekzistas nur la jena ebleco:

En urbo Gyula, 200 km sudoriente de Budapeŝto, kie okazas Somera Esperanto-Universitato. Inter 05-11 de julio. Tranoktoj, en du studentaj domoj: a/ 8ĉ. po 4; 1 ĉ. po 3; 1 ĉ. po 2; 1 ĉ. po 1; b/ 16 ĉ. po 3 aŭ 4, sume 38 + 64 = 102 lokoj. En hotelo (sama) 10 ĉambroj po. 2 Salonoj certigitaj, kulturprogramo sama kun SEU. Partoprenkotizoj en studentaj domoj ĉ. 1300 forintoj por 1 persono, en hotelo ĉ. 2000 forintoj por 1 persono. La prezoj inkluzivas tranoktadon, manĝadon, kulturprogramon kaj la salonojn. Ne estas kalkulitaj al la kostoj eventualaj elspezoj regajndaj de ILEI.

Partopreno de reprezentantoj por ronda tablo eblas. (Ni pensis pri jenaj instancoj: Tutlanda Pedagogia-Metodika Instituto, kleriga ministerio, pedagogia sindikato ktp). Inaŭguro en la festsalono de Urba Konsilio. Ekskurso ankoraŭ preparenda, eble al Szeged aŭ Debrecen.

La alia ebleco antaŭvidita (Gödöllő) bedaŭrinde falas...

Mi petas vin, bonvolu konsideri la suprajn eblecojn. Ni tre ĝojus, se ILEI Konferenco okazus en Gyula, kiu estas agrabla urbeto. En la lastaj jaroj la kostoj de turismaj servoj en nia lando signife altiĝis.

Malgraŭ la tre malalta antaŭvidita partoprenkotizo mi timas, ke ne multe da esperantistoj el socialismaj landoj povos alveni (sed certe pli ol al iu nesocialisma lando).

Kun sinceraj salutoj  
**Tibro Vaskó**  
sekretario

P.S.: Unu FRG marko egalas al ĉ. 12 forintoj.

Al Estraranoj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Estimataj,

Kiel pli frue ni komunikis, ni estas pretaj organizi ILEI-Konferencon laŭ jenaj kondiĉoj:

1. Partoprenontojn el socialismaj landoj varbos HEA pere de la koncernaj landaj asocioj. El la partoprenkotizo de tiuj partoprenontoj HEA ne transpagas onon al ILEI.

2. Partoprenontojn el ceteraj landoj varbos ILEI laŭ sia bontrovo. Por ĉiuj par-

toprenontoj ILEI pagos al HEA jenajn partoprenkotizojn (inkluzive loĝadon, manĝadon kaj ĉiujn programojn):

Partoprenanto loĝonta en ĉambro unu sola	300, — ned. gld.
duope	250, — ned. gld.
triope	200, — ned. gld.

Infano de ses ĝis dekkvarjara loĝonta kaj mangonta ne kune kun la gepatroj sed aparte 100, — ned. gld.

(Infano loĝonta kaj mangonta kune kun la gepatroj — plenkreskuloj — pagas la saman kotizon.)

ILEI — laŭ sia bontrovo — rajtas aldoni al la supraj kotizoj tiom, kiom kovras ĝiajn elspezojn.

3. ILEI devas anonci nombron de partoprenontoj laŭ kategorioj ĝis 30 de aprilo. Partoprenontojn anoncitajn post tiu dato, HEA — manke de loĝloko — rajtas rifuzi sen preni iujn kostojn. (Ĉar kaj la unuope kaj la duope loĝontoj estos en trilitaj ĉambroj, HEA akceptas normale partoprenontojn aldonajn al la jam menditaj ĉambroj, kondiĉe se la pli fruaj akceptas kune loĝi. Kompreneble tiu persono paginta por unuope (duope) loĝi rajtas ricevi la diferencon. (Akceptitaj aliĝintoj ricevos konfirmilon kun informoj.)

4. Rezignoj ĝis 30 de aprilo estas afero de ILEI. Rezignojn post 30 de aprilo HEA akceptas nur, se la rezigninto estas ŝanĝita per alia partoprenonto loĝigebla en la menditaj ĉambroj. El la kotizo de rezignintoj ne ŝanĝitaj per alia partoprenonto HEA postulas 150 ned. gld. de unuope, 100, — de duope kaj 50, — de trio pe loĝanto. (Kompreneble ILEI je sia risko rajtas anonci kaj deponi kotizon ĝis 30 de aprilo por pli ol ĝi kolektis, sed okaze de nepleniĝo HEA postulas laŭ la supraj.

5. Partoprenkotizojn de anoncitaj partoprenantoj laŭ p. 2. ILEI devas deponi ĉe CO de UEA por dispono de HEA ĝis 30 de aprilo. Repagon al rezignintoj minus bankkostoj HEA repagos pere de UEA. Ankaŭ aliĝintoj post la limdato devas pagi sian kotizon al CO de UEA por esti traktataj. Okaze de neakcepto HEA repagos la partoprenkotizon sen subtrahi bankokostojn.

6. ILEI kolektas la partoprenkotizojn en valuto laŭ sia bontrovo kaj transpagas al CO de UEA tiom, ke ĝi en la momento de ricevo egalas al la supre difinitaj partoprenkotizoj. Gajnoj kaj perdoj pro la kurzo ŝanĝoj ĝin la tanspago al CO apartenas al ILEI, post la alveno al CO, al HEA. (Okaze de repagoj al rezignintoj al la rezignintoj, te. HEA repagos en ned. guldenoj senkonsidere, ĉu la nacia valuto de la rezigninto altiĝis aŭ falis.

7. La konferenco okazos inte 11-a de julio (alventago) kaj 21-a de julio (forvertago) en domaro de Agrikultura Universitato en urbeto Gödöllő, 21 km-ojn for nord-oriente de Budapeŝto. Inter Budapeŝto kaj Gödöllő estas kontentiga trafiko: unuflanke aŭtostrato, mallong-distanca elektra fervojo, kiu trafikis 20 minutojn ofte ek de finstacio de metroo-linio.

La agrikulturan Universitaton ĉirkaŭas bela parko kaj arbaro, somere tre agrabla medio. Samloke oni povas loĝi, manĝi kaj konferenci. Oni facile povas viziti Budapeŝton.

La studenta hejmo havas 3-litajn ĉambrojn, ili uzeblas por 3, 2, resp. por 1 persono/j. Al ĉiu ĉambro apartenas lavniĉo kun varma-malvarma akvo, kaj en la fi-  
noj de la koridoroj komunaj duŝejoj.

Manĝoj 3-foje tage en la memserva manĝejo de la studenta hejmo.

La universitato havas plurajn diversgrandajn prelegejojn kaj seminariejojn.

La Instrua Komisiono de HEA organizas semtempe kaj samloke (sed en alia konstruaĵo de la Studenthejmo) tendarlernejon por 10-14 jaraj infanoj. En ties kadro ni povas akcepti kunvenantajn infanojn de la konferencanoj. Aĝlimoj de la gastoinfanoj estas 6-14 jaroj.

8. Programo: elektu el la proponoj de s-ino Zs. Barcsy pli frue senditaj.

Por via informo:

9. Honorarioj, repagoj al prelegintoj kaj aliaj kontribuintoj: HEA interkonsent-  
tos aparte kun la koncernaj personoj.

10. Trafiko: je propraj kostoj.

11. Subvencioj: HEA subvencios siajn membrojn pedagogojn, kiuj instruas Esperanton; laŭ anticipaj interparoloj ankaŭ LA en socialismaj landoj. Por la sub-  
venciotaj partoprenontoj HEA rajtas disdoni informmaterialojn en neta kotizo. Laŭ la ĝisnunaj interkonsentoj HEA anoncos por partoprenontoj el socialismaj lan-  
doj:

partoprenonto loĝonta en ĉambro unu sola	3.000, — hung. forintoj
duope	2.500, — hung. forintoj
triope	2.000, — hung. forintoj
infano 6-14 jara	800, — hung. forintoj

Ni petas Vin, bonvolu konsideri la suprajn kondiĉojn, kaj se Vi akceptas, skribe (telegrame) konfirmu al HEA la Prezidanto kaj/aŭ la Ĝenerala Sekretario de ILEI ĝis 15-a de februaro. Modifi la kondiĉojn aŭ marĉandi pri ili ni jam ne havas tem-  
pon, ni firme devas mendi la necesajn ejojn, ĉambrojn komenci varbadon, pluaten-  
dante ni riskas okazigon de la aranĝo.

Se ĝis tiu dato HEA ne ricevos Vian skriban konsenton, HEA rezignas pri okazi-  
go de ILEI-Konferenco en Hungario.

Kun sinceraj salutoj kaj novjaraj bondeziroj  
**Tibor Vaskó**  
sekretario

Deklaro rektita al HEA, al direktoro Johano Ingusz kaj al sinjoro Olle Olsson.

Pro gravaj malsanoj de la prezidanto de ILEI, rektoro Helmut Sonnabend, kaj de la ĝenerala sekretario, prof. d-ro Mario Dazzini, la estraro de ILEI komisiis la vicprezidanton J. Ingusz respondeci kune kun la kasisto O. Olsson ĉiujn enhavajn kaj administrajn detalojn de la XV, konferenco en Gödöllo (11.7. — 21.7.81).

Sinjoro Ingusz estas mia senpera reprezentanto kaj mi plenpovigas lin konsenti en la nomo de ILEI kun la kondiĉoj postulitaj de HEA en ĝia letero de 1981-01-15.

Li havas la rajton, trakti ĉiujn aferojn kiuj koncernas la konferencon kaj per kiuj ILEI estas tuŝita.

Nia kasisto, sinjoro Olsson, transprenas ĉiujn monajn kondiĉojn por la nesociali-  
smaj landoj.

## Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

I.L.E.I.

15<sup>a</sup> Internacia Konferenco — Gödöllő 1981.07.11.-21.

I . L . E . I .	L K K
Johano Ingusz	Zsuzsa Barcsay
Liget út 40	Bem rakpart 25b
H-1102 Budapest X	H-1011 Budapest

### Aliĝilo

Bonvolu skribi klare, legeble, laŭeble tajpe aŭ preslitere

S-ro/S-ino/F-ino

familia nomo .....

antaŭnomo .....

lando ..... naskiĝjaro .....

loĝloko ..... strato, n<sup>o</sup> .....

Samtempe aliĝas per aparta aliĝilo:

edzo/edzino ..... infanoj .....

.....

## Kotizoj

(Aliĝoj laŭ strikta limigo de HEA nur ĝis 30a de Aprilo)

Unulita ĉambro .....	320, - gld.
Dulita ĉambro .....	270, - gld.
Trilita ĉambro .....	220, - gld.
Infanoj .....	110, - gld.

Ne membroj de I.L.E.I. devas aldoni al la supre menciitaj kotizoj la sumon de 20,-gld (krom infanoj ĝis 14-jaraj kaj familianoj de gekongresanoj).

Mi aliĝas al la konferenco kiel membro de ILEI/familiano/infano/ne-ILEIano kaj ĝiras:

la kotizon kiel membro	nederlandaj	gld .....
la kotizon kiel ne-membro	"	gld .....
la kotizon por infano(j)	"	gld .....

per internacia poŝtmandato al Poŝtĉekkonto: Nederlando 37 89 64 ILEI/2814 15a konferenco

Sendu la aliĝilon al

Johano Ingusz, Liget út 40 H-1102 Budapest X

Mi alvenos la .....

Mi deziras loĝi en dulita/trilita ĉambro kun s-ro/s-ino/f-ino .....

Specialaj deziroj (laŭ ebleco) .....

Dato ..... Subskribo .....

## SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo:	Jean Lehane, 2A Harms st. Toowomba, Queensland 4350.
Aŭstrujo:	Ernst Rixner Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno.
Belgujo:	E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal. E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout. M. Sondervorst, Rue du téléphone 1, B-2180 Mettel. H. Lentzen, Feldweg 20, B-4701 Kettenes.
Brazilo:	Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.
Britujo:	Hilary Chapman, 7 Fairacre road, Barwell, Leicester LE 9 8HH.
Bulgarujo:	Hristo Gorov, B.E.A., Hristo Botev 97, Socio Centro.
Danujo:	Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo:	Pentti Jarvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Francujo:	Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
F R Germanujo:	Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-315 Peine.
Grekujo:	K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506).
Hispanujo:	Francisko Zaragoza Ruiz, Coll. Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
Hungarujo:	Zsuzsa Barcsay, Ben Kp. 25/b, H-1011 Budapest.
Irano:	M. Saghafian, Siras Ave, Emdadi str. 22, Vanak, Teheran 19.
Islando:	Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170 Reykjavik.
Israelo:	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv.
Italujo:	Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa, pĉk 11244548.
Japanujo:	Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
Jugoslavujo:	Miodgrad Stojanović, Duruntorska ul. 2. IV. 32, YU-11000 Beograd.
Kolombujo:	Manuel Angel M., Apartado Aéreo 60179, Medellin.
Luksemburgo:	Robert Hoenerger, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette.
Malto:	Carmel Mallia, 89 Sanctuary str., Zabbar, Malta.
Nederlando:	Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl.
Nordameriko:	John Lewine, West Stockbridge, MA 01266, Usono.
Norvegujo:	Elna Matland, Brekkev 50, N-4200 Sauda.
Nov-Zelando:	Gvenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt.
Polujo:	Stefania Pakalska, Marszałkowska 53, m. 50, PL-00-676 Warszawa.
Sanmarino:	Marina Michelotti, via 25 marzo, 73, I-43031 Repubblica di San Marino.
Sovetujo:	Johannes Palu, Sólme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV. Nikolaj Starodubcev, Poŝtrestante SU-340047 Doneck.
Sud-Afriko:	Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1710 Florida Glen.
Svedujo:	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund.
Svisujo:	Jean Jacques Lavanchy, Traménaz 21, CH-1814 La Tour de Peilz.
Venezuelo:	Esteban E. Mosonyi, Apartado 61500, Chacao, Caracas.

## Izolitaĵ Membroj

Ĉeĥoslovakujo:	Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Píbram.
Ĉinujo:	Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Germana D R:	Till Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brüel.
Jemena PDR:	Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh hospital, Khormaksar, Aden.
Kubo:	Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Malagasujo:	Eugene Raveloson, B.P. 127, Antananarivo.
Singapuro:	Hongi Liao, apt blk. 14,2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14.
Zairujo:	Antoine-Samuel Ngangu, B P 13, Lukala, Nkandu.



## Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, F R Germanujo.  
Vicprezidanto: direktoro Johano Inguzs, Liget út 40, H-1102, Budapeŝt X, Hungarujo.  
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa, Italujo.  
Vicsekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.  
Financoj: Olle Olsson, Bantorget 2, S-22229 Lund, Svedujo.

## Kunlaborantaj Organizoj

EEC Eŭropa Esperanto-Centro, Arsenalstraat 5, B-2000 Antwerpen.  
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:  
S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussell.  
FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 42 Grande Rue, F-92310 Sevres.  
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.  
UEA Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.  
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoj, F-75007 Paris.  
Konstanta Reprezanto de ILEI ĉe Unesko:  
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj — ILEI  
en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Elmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150, FRG

poŝtĝirkonto: Stockholm, 682-117-7 ILEI, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

jarabono: 30 svedaj kronoj

Instruisto, kiu abonas la revuon, fariĝas membro de ILEI.

Familianoj kaj simpatiantoj pagas la duonon, 15 svedajn kronojn, ne ricevas la revuon sed iĝas membroj de ILEI en la koncernaj kategorioj.

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI aŭ al la supre indikita poŝtĝirkonto.